

La hungaron benu, Di',  
Per gajec', per spikoj,  
Ŝirman brakon tenu, Di',  
Kontraŭ malamikoj.  
Nin delonge ŝiras sort',  
Donu gajan jaron,  
Por Pasint' kaj por Estont'  
Punis vi l' Hungaron.

La praulojn portis vi  
Al Karpatoj gvide,  
Belan hejmon tie ĉi  
Donis vi konfide.  
Kie Tisza kaj Danub'  
Fluas kun muĝdo,  
Floris la heroa trup':  
Gento de Arpado.

Per vi riĉe tra l' Eben'  
Ondis orspikaro,  
Ĉe Tokaj via ben'  
Gutis la nektaro.  
Ofte de l' sovaĝa turk'  
Prenis ni trofeon,  
Ĝemis Vien', fiera urb',  
Matias-armeon.

Sed ni pekis. Ĝermis en  
Vi koler' kaj dubo,  
Kaj vi fulmojn ĵetis, jen,  
El tondranta nuboj.  
Ĵetis vi kun siblaflug'  
Sagojn de tataroj,  
Poste ni sub turka jug'  
Ĝemis dum centjaroj.

Ho, tre ofte en ĉi land'  
Super niaj ostoj  
Sonis turka venko-kant',  
Flirtis ĉevalvostoj.  
Ofte vin, patruj'! la id'  
Vundis per armiloj,  
Iĝis vi pro fil-perfid'  
La cindruj' de l' filoj.

Kaŝis sin la rifuĝnt',  
Grote glav' lin trafis,  
Kuris, kaj en hejma land'  
Hejmon li ne havis.  
Sekvis lin tra val' kaj mont'  
Dub', ĉagren', amaro,  
Ĉe l' piedoj sanga ond',  
Supre fajromaro.

Fortikaĵo? Nun ruin'.  
Fiirtis ĝojhumoro?  
Jen, nun anstataŭas ĝin  
Lamentad', stertoro.  
Ho, liber' ne ĝermis el  
Sangverŝita tero,  
Falas arda larmo de l'  
Prema mallibero.

Ho, kompaton havu, Di',  
Inter ĉi pereoj,  
Ho, hungaron savu, Di',  
El la mar' de l' veoj!  
Nin delonge ŝiras sort',  
Donu gajan jaron,  
Por Pasint' kaj por Estont'  
Punis vi l' Hungaron.

*esperantó fordítás:  
Kálmán Kalocsay (1933)*